

OKA RENDEVUO DIDAKTIKA:

La iĝ- kaj ig-formoj verbaj

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1992 marto 12 & 14

Cl.- Svisa Radio Internacia invitas vin hodiaŭ al oka kaj lasta rendevuo didaktika kun gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

A.- Antaŭ unu semajno ni fakte ekzamenis nur la unuan frazon de la novelo "La Teatra Korbo" de Julio Baghy. Niaj geaŭdantoj certe malkovris, kiom riĉa estas la strukturŝanĝa instruado bazita je la atenta studo de beletra teksto. Ni konkludis tiun pasintsemajnan elsendon anoncanta, ke ni daŭrigos tiun lingvan esploron, kiun ni proponas en kurso por progresantoj.

Cl.- Eble unue ni relegu la enkondukan paragrafon de tiu rakonto aŭtobiografia, kiun Julio Baghy subtitolis "senpretenda babilado".

A.- "Iam, ie estis korbo, duonmetron alta kaj iom longe ovala. Nenio eksterordinara karakterizis ĝin. Ĝi estis nek pli alta, nek malpli bela ol ĝiaj korbofratoj. Solida manplektaĵo el salikaj vergoj. En la laca kapo de metiisto nestis ĉiutagaj panzorgoj dum liaj kalokrustaj manoj donis formon al la korbo."

Cl.- Julio Baghy forĝas interesajn vortkunmetojn. Oni atentigu la lernantojn pri ili kaj pri ties ekzaktaj signifoj:

A.- "Korbofratoj" signifas "korboj fabrikataj de sama metiisto". "Manplektaĵo" estas sinonimo por "korbo". "Panzorgoj" estas vorto, kiu priskribas la zorgojn de malriĉulo kun multaj malsataj infanoj.

Cl.- La adjektivo "kalokrustaj" bone priskribas la staton de la manoj de la korbplektanto. Kaj nun post tiu atento al vortkombinoj niaj rigardoj sin turnu al la verboj transitivaj, kiujn ni ankaŭ nomas diligaj kernvortoj, por reliefigi, ke per tiuj kernaj vortoj ligiĝas la vortoj, kiuj plenumas subjektan kaj objektan funkciojn. Ni ŝatas paroli pri piloto kaj nepiloto. Tiun lastan karakterizas la finaĵo n. Bonvolu legi tiujn pensunuojn, kies kodo ĝenerale estas 102, 1 por la piloto, 0 por la kernvorto kaj 2 por la nepiloto.

A.- "Nenio eksterordinara karakterizis ĝin". "Liaj kalokrustaj manoj donis formon al la korbo".

Cl.- Ni instruu al la lernantoj gravan strukturŝanĝan eblon propra al esperanto. Per la sufikso **iĝ** oni povas netransitivigi la verbojn transitivajn. Tiam la objekto fariĝas subjekto. Kaj prepozicio devas interveni, se ni volas konservi la aganton. "Nenio eksterordinara karakterizis ĝin" tiel transformiĝas al la pensunuoj: "Ĝi karakteriziĝis per nenio eksterordinara". Mi ŝanĝis la vortordon, ĉar en esperanto la pronomo ĝi ĝenerale antaŭas la verbon. Bonvolu aldoni la sufikson **iĝ** al la kernvorto de la pensunuoj: "Liaj kalokrustaj manoj donis formon al la korbo".

A.- "Dankal liaj kalokrustaj manoj doniĝis formo al la korbo".

Cl.- Tiu strukturŝanĝa ekzerco estas tre utila stile. Ĝi komprenigas al la lernantoj, kiel esperanto kapablas ŝanĝi la tonon de rakonto. Vi relegu la tutan paragrafon dirante en iĝformo ĉiujn transitivajn verbojn.

A.- "Iam, ie estis korbo, duonmetron alta kaj iom longe ovala. Ĝi karakteriziĝis per nenio eksterordinara. Ĝi estis nek pli alta, nek malpli bela ol ĝiaj korbofratoj. Solida manplektaĵo el salikaj vergoj. En la laca kapo de metiisto nestis ĉiutagaj panzorgoj dum dankal liaj kalokrustaj manoj doniĝis formo al la korbo".

Cl.- Ni daŭrigu tiun strukturŝanĝan ekzercon, kiun mi konsideras tre grava, provante ne ŝanĝi la vortordon. Mi legas la originalan tekston de Julio Baghy, kaj vi rediru ĝin en netransitiva tono: "Honesto laboro meritas atenton"

A.- "Por honesta laboro meritiĝas atento"

Cl.- "fortika korbo trovos aĉetanton, -"

A.- "por fortika korbo troviĝos aĉetanto, -"

Cl.- "tiel povis pensi la zorgpremata simplulo, ĉar li faris ĝin rimarkinde rezistkapabla..."

A.- "tiel povis pensi la zorgpremata simplulo, ĉar ĝi fariĝis rimarkinde rezistkapabla..."

Cl.- "Kaj ĝi trovis aĉetanton."

A.- "Kaj troviĝis aĉetanto."

Cl.- "En tiu tago freŝa pano kvietigis la malsaton de grandnombra familio."

A.- "En tiu tago dankal freŝa pano kvietigis la malsato de grandnombra familio."

Cl.- "Almenaŭ estas supozeble, ĉar en kabano de la malriĉulo ĉiam abundas la panpetaj buŝetoj. La korbo komencis sian devokonscian vivon."

A.- "Almenaŭ estas supozeble, ĉar en kabano de la malriĉulo ĉiam abundas la panpetaj buŝetoj. Por la korbo komenciĝis devokonscia vivo."

Cl.- "Ĝia vivprincipo estis: "Honesto laboraĵo honeste servas". Fidele ĝi gardis ĉion, kion la gemastroj metis en ĝin."

A.- "Ĝia vivprincipo estis: "Honesto laboraĵo honeste servas". Fidele gardiĝis ĉio, kio metiĝis en ĝin."

Cl.- Vi prave ne ĉiam indikis la aganton, kiam ĝi ne estis nepre necesa. En la iĝtono oni emas malatenti pri la agantoj.

A.- Tiu strukturŝanĝa ekzerco tre similas al tradukekzerco.

Cl.- Jes, tradukekzerco en la lingvo mem profite al stila efekto. La iĝtono malfortikigas la rolon de la aganto. Inversan efekton, kiu devigas nin ĉiam mencii, kiu estas la aganto, oni akiras, kiam per la igsufikso oni transitivigas netransitivajn verbojn. Ni provu: "Iam, ie estis korbo, duonmetron alta kaj iom longe ovala."

A.- Jes, mi devos tuj mencii la korbofaranton: "Iam, ie kamparano estigis korbon, duonmetron altan kaj iom longe ovalan."

Cl.- "Nenio eksterordinara karakterizis ĝin. Ĝi estis nek pli alta, nek malpli bela ol ĝiaj korbofratoj."

A.- Nenio eksterordinara karakterizis ĝin. Li estigis ĝin nek pli artan, nek malpli belan ol ĝiajn korbofratojn."

Cl.- "Solida manplektaĵo el salikaj vergoj."

A.- Ne estas verbo.

Cl.- Ĉe Baghy, kiel ĉe Privat, kiam la verbo esti devus ripetiĝi, ĝi simple malaperas.

A.- Do la frazo fariĝos: "Li estigis solidan manplektaĵon el salikaj vergoj."

Cl.- "En la laca kapo de metiisto nestis ĉiutagaj panzorgoj dum liaj kalokrustaj manoj donis formon al la korbo."

A.- "En la laca kapo de metiisto malriĉeco nestigis ĉiutagajn panzorgojn dum liaj kalokrustaj manoj donis formon al la korbo."

Cl.- La lernantoj konstatas, ke la iĝtono malaperigas la n-finaĵon, dum la ig-tono plioftigas ĝin.

A.- Denove ni tre malrapide antaŭeniris en la trastudo de la novelo de Julio Baghy.

Cl.- Jes, sed ĝuste tiu trankvila ekzameno de stilaj ebloj komprenigas, kiom esprimiva estas esperanto dankal la sufiksoparo **iĝ** kaj **ig**. Kaj ĝuste tiuj tradukekzercoj en la lingvo mem helpas bone kompreni la precizan semantikan rolon de tiuj du sufiksoj, kies ekvivalentoj ĝenerale ne ekzistas en la okcidentaj hindeŭropaj lingvoj. Tial estas tiel malfacile komprenigi per tradukekzercoj al naciaj lingvoj la ekzaktan signifon de iĝ- aŭ ig-formoj verbaj.

A.- Pluraj geaŭdantoj eble ŝatus legi la kompletan dekdupaĝan novelon "La Teatra Korbo" de Julio Baghy. Ili skribe petu ĝin al ni tra la kanalo de Svisa Radio Internacia. Ankaŭ la teskto de nia oka rendezuo didaktika same kiel tiuj de la antaŭaj estas riceveblaj.

Cl.- Vi aŭdis Claude kaj Andrée GACOND, kiuj anoncas, ke bedaŭrinde pro financaj kaŭzoj Svisa Radio Internacia interrompos la esperanto-elsendojn fine de la monato marto. Ĝis reaŭdo!